,Mutig vorwärts!' **Aŭstria Esperantisto** ,Kuraĝe antaŭen'

Aŭstria Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Asocio

7ª jaro. N-o 4 **Monata** **Aprilo 1930**

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Postfach.

Konto bei der Postsparkasse D-123.826 u. 36.783 (Sparkasse Korneuburg).

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ S 4.80, germanlandanoj RM 3.25 alilandanoj sv. fr. 4.25; ponumere: por enlandanoj 45 aŭ. g., eksterl. 55 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Aus aller Welt.

Ein **Esperanto-Gespräch** zwischen den Radiostationen Eiffelturm-Paris und AVRO-Hilversum hat am 12. Februar stattgefunden. Veranstalter waren die Pariser E.-Gruppe und die Niederländische Esp.-Gesellschaft.

Das Internationale Arbeitsamt in Genf hat in seinem Berichte der letzten (XII) Zusammenkunft (Konferenz Genf, 1929) niedergelegt, daß „während des laufenden Jahres der Gebrauch des E. sogar ermöglicht hat, mit Personen und Auskunftsstellen in Verbindung zu kommen, die auf anderen Wegen nicht leicht hätten erreicht werden können."

Das **„Internationale Uebereinkommen über den Eisenbahn-, Personen-, Gepäck- und Güterverkehr"** wurde von dem Vorstand der Kommerziellen Abteilung der Staatsbahndirektion Olmouc, Oberbahnrat Josef Rebiček ins Esperanto übersetzt und im Verlag Moraviaj Esperanto-Pioniroj herausgegeben. Das Werk ist 250 Seiten stark und für S 6.50 durch unsere Zeitung beziehbar.

Die **Schwedische Telegraphendirektion** und die **Direktion der Stockholmer Straßenbahnen** haben offiziell E.-Kurse eingerichtet, um den ausländischen Gästen den Besuch der Stockholmer Ausstellung zu erleichtern.

Der **Parteitag der Sozialdemokratischen Partei Finnlands** (26. I. — 1. II. 1930) hat eine für Esp. günstige Entschließung angenommen.

Die **kath. Oberösterr. Arbeiterzeitung** veröffentlichte eine Preisaufgabe für die Benützer ihres Esperantokurses. Prämien sind wertvolle Bücher. Unter der Rubrik „Volksbildungsecke" nimmt Esperanto einen großen Raum ein. Wir gratulieren dieser mit dem Fortschritte gehenden Zeitung.

E.-Gottesdienst mit Predigt
in der Minoritenkirche-Wien
Sonntag, 20. April, 1/2 10 Uhr.

Einiges über die bisherigen Erfolge der Esperanto-Bewegung in der Welt.

(Fortsetzung.)

Internationaler Rundfunk.

Die Rundfunkwelle kennt keine Ländergrenzen; sie umkreist in einer Sekunde achtmal den Erdball. Die Meldungen können im Rundfunk nur in *einer* Sprache gegeben werden und alle Menschen sollten sie gleichzeitig verstehen können. Darum muß Esperanto die Sprache dieses Raum und Zeit in kaum ausdenkbarer Weise überbrückenden Verständigungsmittels werden. Dies haben die Sendegesellschaften auch erkannt. Daher empfahl der Intern. Bund der Sendegesellschaften auf seiner Tagung in Lausanne (1927) — in der Erwägung, daß der Intern. Kongreß der Radio-Amateure (Paris, 1925) das Problem studiert und E. als Welthilfssprache angenommen und der Völkerbund allen Staaten empfohlen hat, E. als „offene" Sprache des Telegraphenverkehrs zuzulassen; daß die Welt-Telegraphen-Union in ihrer Pariser Konferenz (1925) diesem Wunsche gefolgt ist und E. in Artikel VII ihres Regulativs aufgenommen hat — den Rundfunksendern die versuchsweise Einführung regelmäßiger Sendungen in E. einmal in der Woche während 10—15 Minuten zu dem Zwecke, weit entfernten Hörern die Hauptpunkte ihres Wochenprogrammes bezw. Geschehnisse aus dem künstlerischen, geistigen oder wirtschaftlichen Leben des eigenen Volkes mitzuteilen. Dieser Beschluß wurde vom Vorstand des Bundes (Union Internationale Radiophone) in seiner Sitzung in Como (29. IX. 1929) bestätigt, der seinen Mitgliedern von neuem empfahl, E. die größte Aufmerksamkeit zu schenken und besonders den E.-Unterricht in ihren Programmen beizubehalten. Die Union hat in ihrer Hauptversammlung in Lausanne (31. V. 1928) die früheren Beschlüsse bestätigt und

riet den Stationen, das direkte Einvernehmen mit dem Zentral-Ausschuß der E.-Bewegung in Genf zu pflegen.

Nach einer Statistik, die Dr. Döhler-Riesa im Jahre 1928 im Auftrage des E.-Zentral-Ausschusses aufgestellt hat, haben bisher 211 Sender in 34 Staaten von 4 Weltteilen E.-Darbietungen gebracht, und zwar:

32 Stationen in 5 Staaten von Amerika
11 „ „ 3 „ „ Asien
11 „ „ 2 „ „ Australien
157 „ „ 24 „ „ Europa

Es wurde festgestellt, daß 66 Rundfunkzeitungen von 25 Staaten der Welt dem E. Platz in ihrem Textteil eingeräumt haben.

Kurzwellensender, die mit Hilfe des E. arbeiten, sind in Brasilien, Chile, Deutschland, Frankreich, Italien, Japan, Niederlande, Sovjet-Union, Uruguay und den Vereinigten Staaten festgestellt worden.

E. hat auch im Jahre 1929 im Rundfunk weiteren Boden gewonnen. Es wurde neben den E.-Kursen im Radio täglich mindestens ein E.-Vortrag von irgendeiner europäischen Station gesendet.

Das E.-Rundfunkprogramm, das von der Kommission für Radio-Statistik zusammengestellt wird, erscheint regelmäßig wöchentlich und wird auch von einer größeren Zahl nationaler Funk - Zeitschriften veröffentlicht, so z. B. in Deutschland „Der deutsche Rundfunk“, der „Funk“ und der „Arbeiterfunk“; in der Tschechoslowakei der „Deutsche Rundfunk der Tschechoslowakei“ und beide Ausgaben des „Radio-Journal“; in England, Dänemark, Holland, Polen usw.

Tago de la libro.

En la tuta mondo la esperantistoj memoras la mortotagon de nia Majstro (14. aprilo) per aĉeto de almenaŭ 1 libro. Ankaŭ vi karaj legantoj agu same.

Lastatempe aperintaj libroj:

Remarque: En okcidento nenio nova Ŝ 9.—
Storm: Du majstronoveloj „ 4.32
Trögel: E.- kaj kulturo „ 1.44
Bibliografio de Lingvo Intern. „ 17.50
Dietterle: Zamenhof verkaro „ 25.50
Jung und Wingen „Das leichte E.“ „ 2.16
Wien, gvidlibro ilust., 64 pĝ. „ 1.50
Alf. Dormanns: Handbuch d. Esp. „ 5.40
Stellan Engholm: Al Torento „ 2.70
Fruictier, Kompleta gramatiko kaj vortfarado en E., komplet. de Grenkamp.

Ĉiuj libroj riceveblaj pere de nia gezeto!

Adresaro.

Da sich nicht genügend Personen hiezu gemeldet haben, so unterbleibt das Erscheinen des Adresaro, um der Allgemeinheit kein unrichtiges Bild der E.-Bewegung zu geben. Die bereits bezahlten Beträge von 30 bezw. 40 gr. werden den betreffenden Personen für ihr weiteres Bezugsrecht gutgebracht.

Plej koran saluton kaj gratulon al

HEROLDO de ESPERANTO

okaze de ĝia dekjara ekzisto.

Jubilea numero aperos la 25. aprilo en amplekso de minimune 64 paĝoj. Mendu tuj!

Volkszeitung.

Estas por ni kordeziro publike gratuli al Volkszeitung-Wien okaze de 75jara ekzisto.

Volkszeitung estis la unua granda gazeto en Aŭstrio, kiu favoris nian lingvon kaj publikigis en sia dimanĉa numero de „Volkszeitung“ kaj „Kleine Volkszeitung“ kun eldonkvanto da 360.000 ekzempleroj kiel unua Esperanto-kurson kaj per tio faris grandan propagandon por Esperanto en la plej malproksimaj lokoj de nia lando, ĉar Volkszeitung ĉie estas legata. Nun post finiĝo de la kurso la redakcio publikigas en sia dimanĉa numero en granda aparta Esperanto-Ecke tre interesan materialon pri kaj en Esperanto kaj per tio daŭrigas la propagandon por nia lingvo. Nia samideano Siedl verkas la rubrikon.

Ni elkore dankas al Volkszeitung kaj deziras, ke ĝi ĝis sia 100jara datreveno daŭrigu sian laboron por Esperanto — se ankoraŭ necese!

Steiner.

S-ro Josef Preis, iama urbestro de Salzburg, kiu estis protektoro de nia Landa Kongreso en Salzburg 1925 kaj multe favoris Esperanton, ricevis la Grandan Honorinsignon pro siaj meritoj por la respubliko. Ni elkore gratulas!

IEMW., AEA., Grupo Salzburg, E.-Societo por Stirio.

Tiberiu Morariu, nia rumana samideano, kiu nuntempe kun granda sukceso instruas laŭ Ĉe metodo en Sveduio, perdis tie — sian koron al bela fraŭlino L. Anderson en Oerebro.

Al la gratuloj, kiuj venis el multaj lokoj — Radio-stacio de ĉefurbo Bukuresti eĉ sendis koran radiogratulon en sia vesperprogramo — ni aliĝas.

Steiner.

„B I L" [1])

De Walter Smital, fakoficisto de National-Bibliothek en Wien.

Ni konsideris la pozicion de BIL[2]) en nia literaturo.

Nun pri ĝia valoro teoria. Esperantisto konkretigos ĉi tiun demandon jene: Kiel statas nia afero relative kaj absolute; kiom ĝi progresas?

La relativa stato, t. e. kompare al aliaj lingvoj internacie uzataj resp. por tiu uzo projektitaj, estas certe kontentiga: La sola konkuranto inter la lingvoj naturaj, la angla, en sia evoluo internacien estas nepre superata de la E-evoluo; komplika ortografio, prononcaj malfacilaĵoj kaj multsignifeco de multaj vortoj baras tiun vojon al ĝi evidente, krom la sufiĉe jam akcentita kulturpolitika motivo kontraŭ ĉiu lingvo nacia. — Inter la komprenigiloj kreitaj por internacia uzo [BIL traktas 323 tiajn] nur du estas konsiderindaj iom por komparo. Sed jam nedetala kontraŭstarigo de la paĝonombroj bezonitaj por ĉiu diras ĉion:

		Esperanto:	Ido:	Occidental:
Divastiga literaturo (= propagandiloj, lernlibroj + vortaroj)	94	246 pĝ.	15 pĝ.	eĉ ne 1½ pĝ.
Gazetoj	48			
Traduka lit.	47			
Originala „	57			

La demando pri la absoluta stato de nia afero ne koincidas simple kun la demando pri la stato de la literaturo; tial ĉi lasta ankaŭ ne respegulas la aferstaton entutan precize kaj ekskluzive, sed nur laŭ ĝeneralaj trajtoj kaj parte. Due oni devas konsideri la fakton, ke „la literaturo" enhavas du grupojn por supra demando ne egale gravajn: aĵojn daŭre valorajn (ne nur por muzeo, sed por la lingvanaro) kaj aktualecajn, kiuj baldaŭ perdas sian valoron por granda publiko. La materialo de l' unua grupo devas esti kalkulata tutsume, tiu de la dua laŭtempe. Al la lasta precipe la gazetoj apartenas, parte ankaŭ propagandiloj. En tute ĝusta perspektivo ni povas prijuĝi la lastan absolutan staton de la literaturo nur, se ni konsideras ĝin fazo de evolua procedo. Ni do antaŭe respondu la demandon pri la evoluo.

Por prijuĝi la lingvan evoluon ne ĉiuj literaturaj branĉoj egale valoras. La tri grupoj, kies laŭtempe diversa amplekso plej klare kaj rapide indikas progreson aŭ malon, estas: 1. la originalaĵoj, 2. el la traduka literaturo, la proza + poezia, 3. la disvastiga, kiu ampleksas propagandilojn, lernlibrojn kaj vortarojn.

1. Da originaloj ni havis ĝis 1896 nur tiujn el la „unua broŝuro"; la jaroj 96, 97 alportis po 1, 98 : 2, 01 : 1, 03 : 2, 04 : 3, 05 : 5, 06 : 7, 07 : 10 (efiko de l' unua kongreso!); de 1908—13 aliĝas mirinde-regule ĉiujare mezmez. 13; milito efikas jene: 1914 : 8, 15 : 4, 16 : 1, 17 : 2, 18 : 2, 19 : 2; malrapide rekreskas la pliiĝoj 1920 : 4, 21 : 5, 22 : 11; inflacio premas plej forte en 1923 : 2; depost 1924 regule mezmez. 9. La evoluo 1916—21 egalas do la bildon 1900—05, la tuj postmilita tempo al la lasta antaŭkongresa; tiu de 1927—28 al tiu inter 1905—07. El grafika daŭrigo de la evolulinio antaŭmilita rezultas, ke sen malhelpo mondmilita tiu tendenco estus kondukinta al la „rezulto 1928" jam en 1918—20: tio signifas, ke la permilita perdo sumas 8—10 jarojn resp. proksme. ⅓ je verkoj. — Iom alie, kvankam tute analoge, aspektas

2. la evoluo de l' traduka belliteraturo. Ĝi prezentiĝas jene: De 1888 ĝis 1896 ĝi atingas normale (1, 2, 0, 3, 0, 2, 3, 5, 6) la sumon 22, paralelas la

[1]) En la unua parto de l' artikolo (AE, n-ro 3 nj., pĝ. 27—28) bonvolu korekti en linio 9: „ĝiaj"; l. 21: „Collinson"; pĝ. 28/l. 10: „monumenta".

[2]) P. E. Stojan: **Bibliografio de Internacia Lingvo.** Genève, UEA, 1929. 560 pĝ.

linion de l' originaloj ĝis 1905 kaj de tiam krute leviĝas en ideala glateco kun mezmez. 39 verkoj en ĉiu jaro ĝis 1914. Militefiko 1915 : 10, 16 : 4, 17 : 1, 18 : 2, 19 : 5, 20 : 10. Pli energie ol la originala resaniĝas la traduka literaturo. Sed ĝi ne povas sendependigi sin de la ĝenerala mizero inflacia, la libroj ankoraŭ nun estas „tro multekostaj". Tiel klariĝas la reakcio relativa en 1924—28 kontraŭ la inflacia tempo (1921—23). Perdo: 10—12 jaroj resp. $^{2}/_{5}$ je verkoj.

Jen sekvu komparaj linioj sur tempobazo komuna:

Pliiĝoj en la jaroj

	1887(88)—95	1896—1903	1904—05	1906—14	1915—20	1921—23	1924—28
original.	—	1	4	11,5	2,5	6	9
		[t. e. prksme.		1 :	$^{1}/_{4}$:	$^{1}/_{2}$:	$^{3}/_{4}$]
traduk.	2	2	1,5	39	5	24	20,4
		[t. e. prksme.		1 :	$^{1}/_{8}$:	$^{5}/_{8}$:	$^{1}/_{2}$]

Nun ni ĝuste taksos la finajn nombrojn (201 originaloj, 617 tradukverkoj beletraj) kaj ĝojos pri la jaraj meznombroj en la tempoj antaŭmilita, milita, „inflacia" kaj postmilita, kiuj lastaj en sia rilato al la antaŭaj pruvas nerefuteble la internan forton de nia lingvo kaj ĝian esperigan tendencon supren.

(Daŭrigota.)

IX-a Aŭstria Esperanto-Kongreso, Linz a. D., 28.-29. junio 1930.

IV-a bulteno.

Honora Komitato (Daŭrigo):

Landestro-anstataŭanto d-ro Josef Schwinner
Urbestro-anstataŭanto Leopold Kraft

Invitiloj kaj aliĝiloj: Dank' al la afabla subteno flanke de Fremdultrafikoficejo estis eble, eldoni la aldonitajn invitilojn. Ni invitas ĉiujn s-anojn plenigi kaj plej baldaŭe sendi ilin al LKK samtempe enpagante per aldonita poŝtĉeko la malgrandan kotizon. Unu ĉeko estas uzebla por enpago de kelkaj aliĝoj.

Programo: Laŭ iniciato de Fremdultrafikoficejo la programo estis pliriĉigata (v. aliĝilon). Resuma programo en la maja numero.

Premioj: Magistrato de Linz afable disponigis 3 valorajn premiojn por la varbintoj de la plej multaj kongresanoj. Kolektu aliĝojn kaj sendu la aliĝilojn kaj kotizojn kiel eble plej frue. Vi per tio plifaciligos nian laboron.

Plej moderna propagando: Antaŭvideble la Linz-a aviadisto Vess Wannek superflugados dum la kongreso la urbon per aeroplano, sur kies portflugiloj estos pentrita konvena E.-varbteksto, propagando, kiu certe okazos la unuan fojon en la historio de la E.-movado. Dum la restado de la kongresanaro sur Pöstlingberg — je favora vento — la aviadisto Hans Wannek ĉirkaŭflugos la monton per sia aviadilo „Linz" je honoro de la kongreso.

Radio: „Radio-Wien" afable konsentis, ke s-ano Smital dum sia „Esperantowerbung für Oesterreich" (ĉiumerkrede) parolos pri sciindaĵoj koncerne la kongreson kaj Linz. Speciala Radioparolado pri Kongreso kaj Esperanto okazos la 23. junio dum la vesperaj horoj el Radio-Linz, Ondo 245.09. Preciza tempo sciigota!

Alilandaj gazetoj raportis: Heroldo de Esperanto, Marto, Hungara Heroldo.

Esperanto-Poŝtkartoj: Estis nun eldonataj 3 diversaj foto-poŝtkartoj de Kongresurbo Linz, fama loko Hallstadt en Salzkammergut kaj montarlago Gosausee kun Dachstein. Prezo 20 gr po karto. Krome haveblaj 5 diversaj koloritaj de Linz po 15 g.

Venu al Linz! Aliĝu jam nun!

Por LKK: Wannek, prez., Linz, Weissenwolfstr. 31; Ulbrich, sekr.

Supra Aŭstrujo kaj sia ĉefurbo Linz a.D. Gvidfolio 4 paĝa kun du bildoj, eldonita sub la aŭspicoj de UEA. pere de Urboficejo kaj Landa Unuiĝo por Fremdultrafiko, de kie ĝi ankaŭ senpage estas ricevebla. (Kial „Aŭstrujo", kial „sia"?)

AE. estas legebla krome en:

Wien: Café Frauenhuber, I., Himmelpfortgasse 6 (pere de d-ro Sós).

Hotel Kaiserhof, IV. Frankenbergg. 10.

Linz an der Donau.

Ekzistas du specoj da homoj: kritikemaj kaj sinceraj, pesimistoj kaj optimistoj. Veninte nian urbon la unua eble dirus: „Linz estas urbo sen speciala vidindeco“ kaj la alia: „Linz estas moderna urbo, progresema kaj vivema, kun belega ĉirkaŭaĵo, kiun nur posedas malmultaj urboj en Aŭstrio.“ Kaj certe, ekkoninte detale la urbon, ambaŭ diros: „Linz estas bela urbo, inda esti vizitata!“

Antaŭ 100 jaroj Linz estis malgranda loko kun 22.000 enloĝantoj; 1869 nur 30.538 — do tiel nomata „provinca nesto“ —. Sed en 1900 ĝi nombris 58.691, kreskis ĝis 1910 al 67.667, 1920 al 93.473 kaj atingis 1. januaron 1930 112.772. Spite senlaboreco, spite malfacilaĵoj la urbo tiel evoluis.

Linz nun estas grandurbo, moderniĝanta de tago al tago. Tramvojoj, ĉien aŭtobuslinioj, vespere lumreklamo, flughaveno, ... moderna vivo. Alvenas kaj forveturas ŝipoj al Passau kaj ĝis Nigra Maro. La fervoja trafiko en 1929: 64.082 trajnoj . . . Tia estas Linz.

22. Univ. Kongreso de E.

Oxford, 2.—9. aŭgusto 1930.

Leteradr.: 142 High Holborn, London, WC 1.
Kotizo: Ni devas korekti 25 sv. fr. (ne aŭ. S.) ĝis 1. julio, poste 30 sv. fr.

19. Germana E.-Kongreso en Dresden.

Pentekoste 1930.

La programo pliriĝiĝis per tio, ke en la solena malfermo okazos recitado de f-ino Elli Reicher (filino de Emanuel Reicher) kaj muziko de Aronkvarteto.

La du E.-organizaĵoj en Ĉeĥoslovakujo favore al Dresden-a Kongreso decidis, ne okazigi sian nacian kongreson ĉijare. Ankaŭ el aliaj landoj jam anoncis sin samideanoj.

Pastro Ĉe de 1.-15. junio gvidos kurson en Dresden.

Anoncu vin tuj kaj informu min pri via partopreno. Uzu tuj la al n-ro 2 aldonitajn aliĝilojn! Informojn donas la Komitato, Dresden-A., 1, Waisenhausstraße 20. Steiner.

Kreditleteroj en Esperanto! La bankejo Gebr. Arnhold, Dresden, kies pionirlaboro sur la kampo „E. en la bankfako“ estas ja konata, uzas „Vojaĝ-kredit-leterojn“ presitajn en germana, franca, angla kaj E.-lingvoj. La banko korespondas en E. kaj elmontras afiŝon pri monŝanĝo ankaŭ en E. Preferu tiun bankon por viaj germanaj negocoj; uzu ĝiajn servojn jam okaze de 19. Germana E.-kongreso en Dresden.

Internacia Ekspozicio de Higieno-Dresden 1930 eldonis bele ilustr. 10 paĝan faldprospekton. Mendu ĝin! Dresden-A., Lennéstraße 3.

Jubilea Foiro en Budapest per E.-prospektoj, kalendaretoj kaj afiŝoj invitas al partopreno. 3.-12. majo. Uzu la rabatojn! Foiro, Budapest, Alkotmány-ut. 8.

Int. Esperanto-Muzeo en Wien

Wien, I. Augustinerstrasse 7.

Internacia Honora Komitato:

Novaj membroj:

Aŭstralio Okcidenta:

The Right Hon. G. T. Franklin, C. M. G., M. L. A., J. P., Urbestro de Perth.

S-ro W. Clubb, Direktor of Education, Educational Department, Perth.

Internacia Kuratora Komitato:

Aŭstralio Okcidenta:

F-ino Mary Carbarns Jeffrey, D. B. E. A. (Hon.)-Subiaco.

S-ino Louis C. S. Mansfield, Kt. Bs., D. B. E. A. (Hon.)-Subiaco.

Komence de majo nia nova hejmo en Neue Hofburg estos plene instalata. Tiam komencos la transloĝiĝo tien. En junio ni espereble jam malfermos al niaj samideanoj la novan hejmon.

Materialo ricevita:

301. UEA.-Genève; 302. E. Markau-Potsdam; 303. „Pana“-eldonejo-Frankfurt a. M.; 304. d-ro Leono Zamenhof-Warszawa; 305. Verona E.-Asocio-Verona; 306. Centra E.-librejo-s'Gravenhage; 307. I. Ramolfo-Torino; 308. Josef Rebiĉek-Olmouc; 309 kaj 316. Moraviaj E.-Pioniroj-Olmouc; 310 kaj 317. Robert Kreuz-Genève; 311. Janis Andersons-Riga; 312. Anna Tuschinski-Danzig; 313. Hungara Heroldo-Budapest; 314. H. Sentis-Grenoble; 315. prof. Schaden-Sao Benefacio (Brazilio); 318. K. Walter-Berlin; 319. E.-Biblioteko „Nova Kulturo“-Burgas; 320. N. W. Frost-Brownfield; 321. Jan Zawada-Warszawa; 322. Lydja Zamenhof-Warszawa; 323. Heroldo de Esperanto-Köln; 324. W. I. Thieme & Co., eld.-Zutphen (Nederl.); 325. prof. H. Boucon-Annecy.

Nia „Honora Membro“ **Lydja Zamenhof** sendis por la Muzeo urnon kun tero prenita de l' tombo de nia Majstro, krome desegnaĵon de la naskiĝdomo, farita de Moscheles, kaj du bonajn bildojn de d-ro Zamenhof.

La problemo de demokrateco.

De d-ro Ignaz Seipel.

Pri tiu ĉi laŭepoka problemo la aŭstria ekskanceliero d-ro Seipel la 18. II. 1930 paroladis laŭ invito de „Asocio de la politikscienculoj“ en Graz. La vasta Kammermusiksaal estis plenplena; ĉeestis ja ĉiuj, kiuj inter la juristoj de Graz distingiĝas laŭ nomo kaj klaso, la ĉefoj de l'aŭtoritatoj publikaj k. t. p. Preskaŭ solena atmosfero estis, kiam d-ro Seipel finis sian ja senkonceptan, sed tamen oratoran paroladon, en kiu li severscience, sen ia politikado, sen cito de popoloj, regnoj aŭ partioj pritraktis la gigantan problemon. Tial la parolado certe meritas diskonigon per Esperanto, kiun li ĉiam simpatias, — en aŭstria E.-gazeto. —

D-ro Adolf Halbedel, Graz.

Estas memkompreneble, ke la problemo de la demokrateco en mallonga horo de parolado ne povas esti solvata.

Minimume depost la tempoj de la grandaj grekaj pensuloj ĉi tiu problemo okupas la plej elektitajn spiritojn kaj la vastan publikon. De tempo al tempo oni opiniis ĝin tiom solvita, ke oni povis ĝoji pri la demokrateco en la faktareco de la vivo.

Sed la plej akra malamiko de tiu ĝojo ĉiam estas ree la *praktikado.* Ĉu ja la sistemoj demokrataj ŝajnis plej ekzakte elcerbumitaj, la principoj demokrataj plej konsekvence praktikataj, tamen la homoj demokrate regataj baldaŭ ree trovis „haron en la supo“. Aŭ la demokrateco montriĝis tiel *tropintigita*, ke per ĝi la ŝtato fariĝis nekapabla al agado; aŭ frue -malfrue ĝi estis senmaskata kiel *mondo de nura ŝajno,* kiu ja promesis al ĉiu ĉian liberecon, sed fakte kreigis regadsistemon, kiu nenia malpli estis ol demokrata. Tiel la historio de la politike organizita homaro ŝajnas pruvi, ke la demokrateco *eterne restos problemo.*

Ĉi tiu ekkono devigas nin esti modestaj. Ni unue kontentiĝu markadi, *kio je la demokrateco estas problemeca.*

Kiam ni nin okupas pri nia objekto sub tiu ĉi limigo, ni kompreneble neniel sole teorie parolas pri la demokrateco. Ni ne okupas nin pri demokrateco en senaereco, ne sen konsiderado al la homoj, kiaj ili efektive estas, ne pri la demokrateco en la klasika antikveco, ne pri estonta epoko ankoraŭ utopia. La demokrateco estas problemo *por ni*; eble pli por ni, ol por aliaj antaŭ ni aŭ post ni. La *ideo* de la demokrateco ne estas problemo. Por ni estas klare, ke la naturaj organizaĵoj de l' homoj sc. tiuj, kiuj ne kiel la eklezio katolika senpere dependas de di-aŭtoritate bazita kaj la homan intelekton superanta revelacio, estas submetitaj al la natura leĝo de l'evoluado kaj maturiĝado. Tial la organizaĵoj de l' homoj devas iam *kreski al matureco de memdestino*; kaj sciu ju pli, des pli ili, intencante memstarecon, estas destinitaj ne sole por servi suborde al pli frua organizaĵo, do, antaŭ ĉiuj la ŝtatoj kaj nacioj.

Certe estas vero, ke ekzistas aĝoj, dum kiuj la homo, ĉiu homo — bezonas zorganton kaj pedagogon. Estus trompa donaco, se al tiu, por kiu ankoraŭ zorgado kaj edukado necesas, oni ĵetus en la sinon la perfektan liberecon, kiu decas nur al plenkreskulo. Iuj neniam fariĝas tiel maturaj, por mem prizorgi siajn aferojn; ili restu prizorgataj. Sed normala tia stato ne estas. Same nenormale, eĉ kontraŭnature estus, se la popolindividuoj neniam maturiĝus por la memdestino. *Malbonaj spertoj, kiujn la demokrateco peradas*, tial ne devas delogi, elŝuti kun la banakvo la infanon; *ili* ne devas fari la demokratecon problemo, sed devas instigi, ekzameni tion, kio havas la nomon demokrateco, *ĉu ĝi estas demokrateco vera,* kaj esplori, ĉu la demokrateco al la koncernaj popoloj estis donata en la ĝusta tempo; ne tro frue, kiam la popoloj ne estis ankoraŭ maturaj.

La tuta homaro, almenaŭ en Eŭropo kaj en la aliaj kontinentoj, kiom ties homaro de Eŭropo devenas, estas tiel evoluinta, ke la vivado en demokrateco

por ĝi estas la normalo, apud kiu ĉiu alia formo, administri la aferojn de komuneco estas escepto. Ĉi tiu sintenado fariĝis tiel komuna, ke formoj ŝtataj kaj regadaj, kiuj alitempe ŝajnis neebligi la demokratecon, ĝin ne plu neebligas, kaj ankaŭ de ĝi ne estas neebligataj. Ekz. *kiaj monarkioj* povas ekzisti, *diferencas de la respublikoj* ne tial, ke la unuaj pli ol la respublikoj kontraŭas al la libereco demokrata. Inverse la respubliko tute ne estas plu samsignifaĵo de libereco kaj demokrateco. Male, kompare al kelkaj respublikoj tie kaj tie, la monarkio estas jam sentata defendo de la libereco. Malo de la respubliko estas nur jam la *diktatoreco.*

Tiu ĉi diktatoreco nenion havas komunan kun la klasika de la ŝtatjuro romana. Tiu estis respublikana magistrato, kiu sufiĉe ofte en tempoj de plej granda mizero de la patrujo portis la savon unikan. *La eblecon de tia diktatoreco ĉiu konstitucio respublikana* devus enhavi; la plejmultaj ĝin ja enhavas en formo de *paragrafoj por krizoj kaj esceptaj cirkonstancoj.* Sed malpacigebla kun demokrateco estas diktatoreco kiel daŭraĵo: tiu diktatoreco, kiu en si mem trovas sian celon; ja estas tute egale, ĉu diktatoro estas unu homo aŭ multaj, ĉu unu uzurpulo aŭ origine laŭleĝa aŭtoritato, aŭ partio, aŭ klaso.

Tian diktatorecon ni rifuzas
Kio je ĝi do estas problemeca?

Unue jam la *havinganto de la libereco* demokrata.

En la historia evoluado de *la* libereco demokrata ni konstatas, ke ankaŭ en la popoloj, kiuj ĝin plej frue adoptis, nur iom post iom ĉiam pli vastaj rangoj kaj medioj estis ĝin ekĝuintaj. Kvankam oni sciis, ke ĉiu liberulo estis plenvalora membro de la ŝtata komuneco, oni tamen diferencigis *plen-, duon-* kaj *neliberulojn.* Rekonante la egalrajtecon de la civitanoj oni unue ne donis la civitanecon al parto de kunloĝantoj de lando aŭ faris ilin civitanoj kun malpli vasta rajto. Ĉi tiu evoluado forpasis almenaŭ idee. Sed alie estas rilate la taksadon pri la popoloj kaj rilate al la internacia dorsflanko de la demokrateco. La *„rajto de memdestino“* de la nacioj ankoraŭ resonadas en niaj oreloj el la tempo dum kaj post la lasta milito. Neniel ankoraŭ estas jam klare, ankaŭ ne teorie, kio estas popolo, kiu por si povas pretendi memzorgadon pri siaj propraj aferoj.

Due estas ankoraŭ problemo la *volesprimado de popolo.*

Unuj parolas por senkondiĉa rekono de la *principo plimulta,* aliaj rigardas la *kompromison* esencaĵo de demokrateco.

Unuj elstarigas la agkapablon de la komuneco, aliaj la justecon en la konservado de la rajto de ĉiuj partoj kaj unuopuloj, esti ne nur aŭskultataj sed ankaŭ kundecidantaj.

La tria problemo estas la *elekto de gviduloj,* kaj reprezentantoj de la demokrateco. Kiel malmulte ŝanĝoj de la elektrajto en aktualaj politikaj malpacoj pravigas atendon de gravaj ŝanĝoj en la potenco, tiel grava por la esenco de la koncerna demokrateco estas la maniero, kiel ĉi tiu problemo estas traktata, kaj la rezultaĵo de tiu pritraktado.

Oni povas aŭ pledi por „libereco unuopula ĝis senbrideco“ kaj lasi al la hazardo, kian rezulton la elektoj havos, aŭ la ligitecon al *rigidaj listoj* per ensistemigo de nombrado de restintaj kaj tutregnaj voĉoj akrigi ĝis solregado (monarkio) de pura kolektivismo partia kaj tiel preskaŭ atingi *vualumitan diktatorecon.* Oni povas serĉi mezajn vojojn inter ambaŭ ekstremoj aŭ entute forlasi la atomisman perceptadon pri ŝtato kaj socio, por, laŭ multaj, unue sur alia fundamento ebligi veran demokratecon.

Tiel ni atingis la *kvaran* kaj *plej grandan problemon,* sciu la demandon, ĉu la demokrateco estas nedisigeble kunigita kun la ideo, ke la homoj tute sen interrilatoj kaj nur tial interegalaj vivas unu apud alia kaj per *nura adicio formas la socion.*

Se prosperus, solvi ĉi tiujn altajn, malfacilajn problemojn de la demokrateco, kiu penetras en najbarajn ŝtatojn, tiam la demokrateco estus savo por la homaro kaj gravega sekurigo de la vivo.

Ĝoje mi ekuzis la okazon, paroli pri tiaj problemoj antaŭ vi akademiuloj, ĉar mi opinias mia tasko, varbadi ĝuste akademiulojn, homojn, kiuj estas en posedado de plena klereco, por ke ili sin pli okupu pri aferoj koncernantaj ĉiujn, por ke ili ne kredu, ke politiko estas nura tekniko. *La politiko estas afero de treege streĉiga kaj longtempe okupatiga laborado de spirito.* Varbadi por tiu ĉi spirita laboro ne nur de la politikscienculoj, sed ankaŭ inter tiuj, kiuj siajn ŝtaton kaj nacion amas, kiuj estas amikoj de la scienco, ni konsideras kiel tre gravan taskon.

Por Esperanto per Esperanto!

(Mia propaganda vojaĝo por Aŭstria tra la Skandinavaj landoj!)

Al mia devizo „Ni nur povas venki, se ni povos montri al la mondo la praktikan taŭgecon de E.“ kaj al mia entuziasmo mi dankas la multajn sukcesojn dum mia norda propagandvojaĝo por Aŭstrio per E. (15. febr.— 26. marto). Antaŭ du jaroj per simpla gratulkarto al Pastro Ĉe okaze de liaj sukcesoj en Svedujo mi konatiĝis kun svedaj esp.-istoj, precipe kun John Johansson, pere de kiu mi estis invitata de Sveda E.-Federacio, E.-Ligo de Svedaj instruistoj, Sveda Laborista E.-Ligo kaj urbestro de Stockholm Carl Lindhagen; poste ankaŭ de la E.-organizoj de Oslo, Kopenhagen, Holbaek, Berlin, Dresden kaj Praha.

En la nomitaj urboj kaj en 13 svedaj Orebro, Karlstad, Norrköping, Eskilstuna, Uppsala, Gefle, Ludvika, Stockholm, Göteburg, Uddevala, Boräs, Helsingborg kaj Malmö mi faris lumbildparoladojn laŭfraze tradukitaj en la nacian lingvon, en Berlin kaj Dresden nur germane.

En Oslo mi krome parolis per Radio, kiun vere efikplenan propagandon iniciatis la tre fervora UEA.-del. Arnes Arnessen, kiu turnis sin al la aŭstria ĝeneralkonsulo Caesar Bang kaj sukcesis per ties helpo aranĝi Radioparoladon. Do mi parolis po dek minutoj germanlingve kaj en E. kun sekvinta traduko norvega de s-ro Arnessen. Ĝen. kons. Bang telegrafe informis „Amtliche Nachrichtenstelle“, kiu donis la informon al Aŭstria Radio-stacio „Ravag“, kies „halo“-isto diskonigis la horon de mia parolado. Dank' al la bonega kaj rapida publikigo en Heroldo de Esperanto (n-ro 9) venis multaj leteroj ktp. al Ministerio en Wien, de kiu venos la respondoj iomete pli poste, ĉar la koncerna referanto sekcia kons. inĝ. Deinlein estas nuntempe for ĉe konferenco en Paris. Mi kore publike dankas al la modelaj UEA.-del. Arnessen kaj Jens Schierve en Oslo.

Mi ankaŭ tre dankas al ĉiuj s-anoj en ĉiuj 19 urboj, precipe al la nelacigebla ĉeforganizinto en Svedujo, redakt. Johansson, al ges-anoj Noll en København, Hansen-Holbaek, Wichert, Dauge, Glück-Berlin, Karsch-Dresden, Koutek-Praha.

La E.-grupoj en Berlin kaj Dresden sendis saluttelegramojn al la E.-protektoroj Bundespräsident Miklas kaj Bundeskanzler d-ro Schober.

Bedaŭre mi ne povas detale raporti, sed mi devas akcenti, ke la „Propagando por Aŭstrio per E.“ multe helpos al la E.-movado en la koncernaj urboj, kie la ĵurnaloj serioze kaj en pli longaj artikoloj pritraktis mian vojaĝon, kvazaŭ „duonoficialan“; la esp.-istoj tie nun eluzu tiun okazon!

Kun ĝojo kaj dankemo mi memoras la subtenon de la aŭstriaj ŝtataj reprezentantoj en tiuj landoj: Ambasadoro Buchberger en Stockholm, ĝen. kons. Bang-Oslo, Schwalbe-Göteburg, Ohlson-Helsingborg, kiu gastigis min en Grand Hotel, kiu hisis la aŭstrian kaj svedan flagojn. ĝen. kons. Sederholm-Malmö, ĝen. konsulejo -København, ambasadorejo - Berlin (kiu sendis du reprezentantojn al mia parolado), ĝen. kons. Eiselt-Dresden kaj ambasadoro d-ro Marek-Praha.

La plej gravaj kunvenoj estis en la koncertdomo en Stockholm (4. III.) kaj en la Universitat-festsalonego en Oslo (6. III.). Entute mi parolis 23foje dum 39 tagoj, vojaĝante pli ol 5500 km.

Mi disdonis al eminentaj instrufakuloj la 30 libretojn „Lehrbefähigungsprüfungen für Fremdsprachen“ de Hofrat Dr. Wollmann (inter la 80 paĝoj estas 20 pri E.!), kiujn nia instruministerio disponigis al mi.

Kompreneble mi ĉiuloke parolis pri Internacia E.-Muzeo dum mia lumbildparolado kaj atentigis la s-anojn al ĉi tiu nobla institucio, kiu ege estas favorigata de nia ŝtato.

La oficiala celo de mia vojaĝo estis plifortigi la korajn interrilatojn inter la nordaj ŝtatoj kaj nia lando (je memoro al la helpo por niaj infanoj). Reciproke mi nun faros lumbildparoladon en Wien pri la nordaj landoj.

R. M. Frey.

Ni elkore gratulas s-ron Frey pro liaj sukcesoj. Li multe klopodis, fari propagandon por nia patrujo pere de nia kara E. Samtempe li ankaŭ informis pri nia plej nobla kreajo „Internacia E.-Muzeo en Wien“.

I-a E.-Kongreso en Okcidenta Aŭstralio.

Originala raporto.

31 landoj estis reprezentataj per delegitoj kaj anstataŭantoj; preskaŭ ĉiuj nacioj sendis salutleterojn. La kongreso estis granda sukceso.

La Universitato de Aŭstralio Okcidenta elektis komitaton por esploro de la utileco de E. kaj tiu komitato nun rekomendas, ke la Universitato envicigu E.-on en la liston de la temoj por la Publikaj Ekzamenoj en 1931.

S-ro Clubb, direktoro de Edukado en O. A., tre entuziasma pri E., proponos en la Kunveno de la Direktoroj de Edukado en Aŭstralio en majo 1930, „ke E. estu farata temo por deviga studado en ĉiuj lernejoj aŭstraliaj.“

Kursoj publikaj kaj pere de la gazetaro kaj Radio estos instalataj.

Komerca Ĉambro de Perth aprobis E.-on per la sugesto, ke ĝi estu deviga temo por „Diplomo Komerca“.

La Kongreskomitato decidis kompili gvidlibron de A. O. kaj historion de la ŝtato, krome fondi E.-statistikoficejon.

Laŭ peto de Int. E.-Muzeo en Wien la Kongreso elektis f-inon M. Jeffry kaj s-ron L. C. S. Mansfield membroj de Int. Kuratora Komitato.

Tutmonda Intersteno (Internacionalstenografio).

Laŭ stenografisistemo, eltrovita de Feliks de Kunovski, fondiĝis **Instituto de Internacionalstenografio** en Duisburg, Friedenstraße 79 kaj nun en ties kadro **Tutmonda Intersteno-Asocio** (T-ISt-A). Samtempe aperis kiel oficiala organo dum februaro nj. la monata gazeto **Tutmonda Intersteno**; jarabono Rm. 2.—.

Int. Metodista Ligo Esperantista.

Antaŭ 1 jaro fondiĝis IMLE. Interesuloj skribu al Kiril Jotov, Ginnheimer Landstraße 180, Frankfurt a. M.

Du boteloj.

De Molnár Ferencz.

Vilaĝana mastro havis la malbonfamon, ke li abunde akvumas la vinon.

Unu tagon venis knabeto al li; li tenis en la manoj du botelojn kaj diris: „La patro petas, ke vi sendu al li litron da ruĝa vino. Jen la mono por ĝi.“

„Sed vi ja havas du botelojn ĉe vi, ambaŭ por po unu litro. Via patro volas eble du litrojn da vino, ĉu ne?“ demandis la mastro.

„Ne, li volas nur unu litron da vino“, respondis la knabo. „Li sendis nur tial du botelojn, por ke vi verŝu en unun la vinon kaj en la alian la akvon.“

Esp.-igis D-ro Sós.

Malnova Kant'.

Printempodor',
Somera flor',
Junec' kaj glor'
Jen baldaŭ for.

Aŭtuna vent',
Pensiga sent',
Animkontent' —
Aŭ akra pent'.

Ho belknabin',
Jen la distin':
En tera sin'
De l' viv' la fin'.

Christine Siedl.

Aŭstria Esperanto-Asocio
I. Augustinerstraße 7

Hauptversammlung.

28. und 29. Juni in Linz.

Die Tagesordnung ist entsprechend dem § 22 der Statuten. Zu Punkt 4: Mit Rücksicht auf die Mandatsniederlegung des gesamten Vorstandes findet außer den alljährlichen Wahlen in den Beirat auch Neuwahl des Vorstandes statt. Unter P. 11 steht der Entwurf zur Geschäftsordnung für den Beirat der AEA. (von E.-Verein für Steiermark ausgearbeitet und an alle Gruppen in Oesterreich seinerzeit versandt) zur Beratung.

Vorschläge, die in zwei Gleichschriften bis Ende April an uns einzusenden sind, werden in der Mainummer verlautbart werden.

Für AEA.: Steiner, Hovorka.

Raporto pri komuna kunsido de AEA kaj AED.

Ĉeestis por AED: Ĉech., Feder, d-ro Kleĉka, Klein, Selzer; por AEA: Hovorka, d-ro Sós, Steiner.

Post finigo de la preparaj laboroj de „Reunuiga Komitato“ kaj interparolo de ambaŭ prezidantoj (dr-o Kleĉka kaj Steiner) la 11. marto la postsekvantaj statutŝanĝoj en plena harmonio kaj plena interkonsento estis de ambaŭ estraroj ĉiuvoĉe akceptataj:

Satzungen des Oesterreichischen Esperanto-Bund.

Genehmigt vom Bundeskanzleramt mit Zahl 82246-9/1929 vom 8. I. 1929.

§ 1. . . . . . Sitz in „einer Stadt Oesterreichs“ . . . . .[1])

§ 2. Nach . . . . „festgelegt ist.“ ist einzuschalten „Insbesonders hat die AEA jeder österr. Esperanto-Verbindung als Plattform für sachliche Beratungen, gegenseitige Unterstützung und auch gemeinschaftliche Arbeiten zu dienen.“

§ 6. c) „durch Ausschluss; . . . . durch“ statt „den Vorstand“ neu „die Generalversammlung über Antrag des Vorstandes“, ferner nach „Vorherige Verwarnung“ ist einzuschalten „durch den Vorstand“. Zu streichen ist „Berufung an . . . . zulässig.“ dafür zu setzen „Durch die Erstellung des Antrages an die Generalversammlung werden die Rechte der Betroffenen zum Ruhen gebracht.“

§ 11. „ . . . . solchen unterstützen“ dann folgt ein Punkt und statt des übrigen Textes „Die Bundesmitteilungen werden vom Vorstande redigiert und gezeichnet.“

Zu § 15 wird von AED beantragt statt „drei Jahre“ in der 4. Zeile unter 1. „zwei Jahre“. Dieser Antrag wurde nicht angenommen, sondern der Generalversammlung vorbehalten.

Nun estas al la grupoj, ke ili trastudu la proponitajn ŝanĝojn kaj decidu en Linz. Tiamaniere ni plisimpligos la laborojn dum la kongreso.

Statutojn ricevis siatempe ĉiu asocio; malgraŭ tio asocioj kaj izoluloj povas ilin mendi de ni; ni nur petas per respondkarto, por kovro de niaj elspezoj.

Post fino de la kunsido s-roj Klein kaj Feder akre protestis kontraŭ tio, ke la prezidanto de AEA prezidu la kongreson en Linz.

Tiu ĉi protesto estis memkomprenebie tute senmotivita, ĉar la aŭstriajn kongresojn ĉiam prezidas membro de la koncerna LKK. Malgraŭ ni en letero al AED. deklaris, ke neniam estis la ambicio de iu estrarano de AEA prezidi en Linz, kaj ke neniu akceptus tian elekton kaj malgraŭ dufoja oficiala invito al kunlaboro por la kongreso, AED per cirkulero al la grupoj en Aŭstrio **sen iu komprenebla kaŭzo rezignis pluan kunlaboron.** Laŭ ricevita informo vicprezidanto de AED kortega konsilisto d-ro Karel Kleĉka, kiu gvidis la aferojn de la jam antaŭe rezigninta prezidanto de AED, eksiĝis el la estraro de AED.

Ni sciigas ĉiokaze nian jam delonge faritan decidon, ke la tuta estraro de AEA demisias. Ni gvidos la aferojn nur ĝis la sekvonta ĝeneralkunveno en Linz.

Por AEA: Steiner, d-ro Sós, Hovorka, Haager, Weber, Müllner.

Ĉe-kursoj.

Laŭ instigo de la Graz-a grupo ni skribis al Pastro Ĉe, ĉu li povos veni aŭtune por gvidi kursojn en Aŭstrio. Li respondis, ke li ne havos pli frue tempon ol en 1931 sed li povos sendi anstataŭanton. Ni nun atendas respondon, kiun Ĉe povos sendi kaj kiom la afero kostos. Ni tuj informos ĉiujn grupojn en Aŭstrio, ĉu ili apartenas al AEA. aŭ ne.

Por AEA.: Steiner, Hovorka.

---

1) Sitz kann Graz, Linz, Innsbruck, Salzburg usw. sein; sollte bei einer Zentralstelle in Wien etwas unternommen werden, dann kann dies ein Vertrauensmann der Estraro in Wien besorgen.

Esperantistoj en Aŭstrio!

Ĉu vi apartenas al landa organizo aŭ ne, ĉu al iu grupo aŭ estas izolulo — ĉies deziro devus esti, partopreni Aŭstrian E.-kongreson en Linz, kiu laŭ la klopodoj de niaj tieaj samideanoj promesas fariĝi nova granda sukceso. La oficialaj rondoj estis interesigataj, ili ĉeestos kaj devos vidi multnombran esperantistan ĉeestantaron — tiam nia movado denove triumfos! Se la samideanoj ne kunhelpos per multnombra ĉeesto — nia movado havos malutiligan malsukceson! Pripensu tion samideanoj kaj agu — kiel ordonas al vi via sento! Aliĝu tuj!

Ni aranĝos de Wien komunan veturadon al Linz. La partoprenantoj ĝuos 25 % rabaton. Anoncu vin tuj al ni! AE.

Gramatneusiedl: Sam. Svehla senpage gvidas kurson kun 18 junuloj en la aĝo de 18-24 jaroj. Tablorondo estis fondata.

Innsbruck: Klubo E. havis sian jarkunvenon la 6. marto. Nova estraro: Prez.-R. Kühbacher, vicprez. — E. Silberstein, sekr. — H. Barek, H. Silberstein, kas. — H. Lorenz, E. Pfeiffer, bibliot. — f-ino Herian, W. Purtscher, konsil. — Langhammer, Griessenböck. La estinta vicprez. d-ro J. Welkoff estis elektata „Honora membro".

Linz: Laŭ invito de Rotary-Klub dir. K. P. Wannek, prez. de Supra-Aŭstria E.-Soc., faris paroladon pri E. Granda sukceso: Interesigo de eminentuloj, gajno de la eldonanto de la plej grava gazeto de Supra-Aŭstrio „Linzer Tagespost" por E.

Linz: SAE.-soc. grupo Linz. La 29. marto s-ro Adalbert Smit el Holando volis paroli pri sia patrujo. 50-60 s-anoj, inter ili 25 el Wels, vane atendis. Poste dir. Wannek anstataŭe parolis pri sia restado en Brazilio.

Salzburg: Grupo de AKLE. „Estonteco" okazigis la 20. febr. sian ĉijaran ĝeneralkunvenon. Estis elektataj prez.-prof. d-ro F. Christanell, ĉefo-Joseph Kaps, sekr.- A. Menneweger, kas.-J. Winkler, konsil.-F. Wesenauer, J. Berger, Fr. Koppens einer, P. Schwab, J. Irnberger. Al la ĝisnuna estraro estis esprimata plej kora danko.

Wien: Polica E.-Unuiĝo havis sian ĝen. kunv. la 20. 2. Novelektoj: prez.-insp. Gaidosch, sekr.-insp. Raff Iseder, kas. s-ano Mitterhofer. Kunveno kune kun „Danubio". Soc.-adreso: Insp. Fr. Gaidosch, 18. Herbststrasse 108.

Wien: Bohema Klubo E.-ista en sia jarkunveno elektis Hon. prez. — prof. d-ro Jokl, prez. — Fr. Franc, vicprez. — kort. kons. d-ro K. Klečka, sekr. — Katarina Balcarova, kas. — H. Suŝilova, bibl. — M. Prohaskova. „Narodni dum", 15. Thurnerg. 9, ĉiumerkrede kunveno.

Wies (Steiermark): Areto da esp.-istoj kunvenas ĉiun dimanĉon. Bernhart.

ESPERANTO-SOCIETO POR STIRIO
Graz, VI., Schönaugasse 6.

(9) Vereinsleitungssitzungen 17. I. und 14. II. Die Anregung unseres Vereines, P. Andreo Ĉe für den Herbst nach Oesterreich einzuladen, hat Widerhall gefunden; von 18 Gruppen in Steiermark, Oberösterreich und Wien liegen Anfragen vor. AEA. besorgt die Vorbereitungen und gibt Auskünfte. Der Stadtschulrat wurde vom neuen Termin für die E.-Staatsprüfungen in Kenntnis gesetzt und gebeten, die Grazer Lehrerschaft davon zu verständigen. Die amtliche Grazer Zeitung veröffentlicht regelmäßig die Ausschreibungen der Prüfungen.*)

(10) OG Graz. Als ordentl. Mitglied wurde aufgenommen: Frl. Marie Machan, Beamtin. Aus der Mitgliederliste wurden gestrichen: H. Hans Binder, Fr. Marie Gürtl (ausgetreten), H. Johann Klobucar (gestorben), H. Josef Mader, H. Rudolf Wimmer. Bartel.

Graz. Loka grupo kunvenas jaŭde 19.30 h en gastejo „Pastete", Sporgasse. Kroniko: 27. II. Raportoj; vetrimado, sed oni ne vendos la poemojn! 6. III. UEA. kiel gasto; regiona kunveno por formale aprobi la skriban elekton de s-ro K. Dürschmid kiel Del. kaj s-ro J. Turk kiel Vicdel.; protesto de la UEA.-anoj kontraŭ la ĝisnuna nekonfirmo de la elektoj flanke de la Viena Ĉefdel. 13. III. Babilaĵoj: La aerŝipo Zeppelin. Komparo inter protekto al bestoj kaj homoj. 20. III. Monatkunveno: Raportoj; debato en fikcia urbestrara kunsido pri la temo: Ĉu oni starigu novan radio-sendstacion? 27. III. Afabla gasto, S-ro Streif, ludis fortepianon kaj akompanis la bele (?) kantantan grupanaron. Programo: 9. V. estrarkunsido; 17. IV., 15. V. monatkunvenoj; 24. IV., 8. V. prelegoj, diskutoj, ekzercado; 1. V. Se estos bela vetero, je la 15 h familia kunveno en kafejĝardeno Schweizerhaus sur Kastelmonto.

*) Wäre auch von den Gruppen in anderen Bundesländern anzustreben. Die Red.

Graz.
Esp.-Verein für Steiermark, Geschäftsstelle (oficejo) Schönaugasse 6/II, Vereinsheim (kunv.) „Pastete", Sporg. 28, Do(j) 20-23 h.

Leoben.
Esp.-Verein für Steiermark: Cafe Weidbacher, Dienstag (ma) 20—22 h.

Innsbruck.
Esperanto-Klub, Gasthof „Grüner Baum", Museumstraße. Do (j) 20—22 h.

Wien.
Katolika Unuiĝo E.-ista en Wien, I. Schottenhof (Akademikerheim) Mi (me) 18.00-20.00 h.
Esp.-Unuiĝo-Wien, I., Himmelpfortg. 6 (kafejo Frauenhuber), Fr. (v.) 19.30 h.
Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, IV, Schäffergasse 3, Mi (me) de 19 h.
Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, ĉiutage 17—19 h.
Esp.-societo „Fideleco", Währinger Bürgercafe, XVIII., Staudgasse 1, Di (m) 16-19 h.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Regierungsrat Hugo Steiner, Bisamberg 248. — Presejo: S. Falk, Wien, XIII, Nobilegasse 4.